

Oscar Bünemann,  
Por la nova jaro

La arboj staras sen folio,  
ne estis floro sur kamparo.  
Kaj tamen scias ni, ke ĉio  
refloros en la nova jaro.

Eterna estas viva forto,  
dormante, ĉio refortiĝas,  
kaj post la vintra ŝajna morto  
la vivo ĉie renaskiĝas.

Pli belaj ŝajnas ĉiujare  
printempa verd', printempa lumo.  
En niaj koroj pli grandare  
deziroj celas al plenumo.

Malhelpoj, batoj kaj laceco  
jam ne estingos la esperon.  
Komuna sent' de fideleco  
antaŭen puŝos la aferon.

Vekiĝu, ĉiuj samcelantoj!  
Admonas vin la jarkomenco.  
Kolektu pli da batalantoj  
kun bona vol' kaj pacienco.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas OSCAR BÜNEMANN (\*1885-06-19 – †1958-06-02).*

*Arg-538-1071 (2010-06-18 14:38:52)*

*Informo pri la verkinto Oscar Bünemann oni trovas en la vikipediejo [http://eo.wikipedia.org/wiki/August\\_Oskar\\_Bünemann](http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Oskar_Bünemann).*